

Flandra ESPERANTISTO

TIJDSCHRIFT VOOR ESPERANTO-ONDERWIJS EN-PROPAGANDA

Verschiĝnt maandelijks
Zeventiende jaargang
Nummer 9 (195)
SEPTEMBER 1950

Vertegenwoordiger in Nederland :
LEEN
sekr. Stadionkade 6, Amsterdam Z.
postrek. 34563 van P.M. Mabesoone
Pythagorasstr. 122 Amsterdam O.

Orgaan van de
VLAAMSE ESPERANTISTEN-BOND
POSTBUS 342, BRUSSEL
Postrekening 2321.50 van V. E. B.

LIDGELDEN :
* Leden : 75 fr.
* Steunleden : min. 150 fr.
Inwonende leden : 25 fr.
(* met bondsorgaan)

ABONNEMENTEN :
België : 60 fr.
Ceteraj landoj : 75 bfr.
Proefn. : 5 fr. (1 r.k.)

ĈU NI ESTAS RIPROĈINDAJ ?

Kelkaj rimarkigoj respondaj al la artikolo « Kongreso 1950 » de s-ro C. v. d. Roest (junia numero p. 1).

1. Ĉu estas ĝuste kompari nacian kongreson kun kongreso, kie diversaj lingvoj reprezentigis (Bulono 1905) ? Mi kredas ke troviĝi meze de alilingvanoj kun Esperanto kiel nura interkomprenilo estas multe pli interese, eĉ emociige, ol kune kun samlandanoj parolantaj Esperanton kun konscio ke eventuale oni povas interkompreni ankaŭ per la nacia lingvo. Cetero en 1905 Esperanto-kongreso estis io nova. Tre multaj ankoraŭ ne laŭsperte sciis, ĉu Esperanto estos taŭga solvo. Pro tio la streĉita atendo en la salono en 1905. Por la nunaj esperantistoj la uzado de la lingvo fariĝis ordinara afero. Ĉu ne estas nia celo ke la praktikado de Esperanto estos tute kutima por ĉiu homo havanta internaciajn interesojn ?

2. En ĉiu movado — t.e. granda kolektivo da homoj kunigintaj por servi al iu ideo — nur malmultaj estas tre aktivaj kaj plejmulto nur modeste kunlaboras. Kaj evidente tiu fenomeno des pli manifestiĝas ju pli iu movado kvante kreskas. Do ŝajnas konsilinde akcepti tiun ĝeneralan faktan kaj gvidan movadon konforme al ĝi.

3. Ankaŭ malpliigo de entuziasmo estas karakterizaĵo de malnoviganta kaj grandiganta movado. La sinoferan fervoron de la pioniroj oni apenaŭ retrovas ĉe posta adeptaro. Kial plendi pri tiu fakto ? Eble entuziasmo estas revekebla per elpenso kaj starigo de novaj organizo-formoj. Sed certe oni ne povas daŭre esti en ekstazo.

4. Ĉu estas ĝuste riproĉi esperantistojn pri manko de aktiveco por la movado, se oni antaŭe allogis ilin kaj varbis ilin en kursoj kaj kluboj per belaj argumentoj pri la valoro kaj uzeblo de Esperanto kaj poste ne plu atentis, ĉu ili vere povas utiligi al si la lernitan lingvon, sed postulas ke ili subtenu la movadon, faru propagandon, gvidu kursojn ?

5. Se grupoj da personoj klopodas propagandi, sed ne sukcesas per ĝis nun uzata metodo, ĉu ili estas riproĉindaj, ĉar ili ne daŭrigas per tiu senfrukta maniero ? Ĉu ne estas preferinde ke ili ĉesu kaj evoluigu novan labormanieron ? Se malnovaj metodoj ne estas taŭgaj, neniu riproĉu, se ni forjetas ilin kaj klopodas starigi pli bonajn.

6. koncerne la kvantan kreskon kun kvalita malpliigo de la Esperanto-movado mi referencu al Malgranda Revuo 1950, n-ro 1, paĝo 22. Tie s-ro Stellan Engholm i.a. diras : « La homoj estas diversaj, ankaŭ rilate al Esperanto. Efektive nur malmultaj havas tiajn kvalitojn, kiuj faras Esperanton vere valora por ili kaj ilin valoraj por Esperanto. Trovi ĝuste tiujn malmultajn estas grava afero, kiun oni dum la lastaj jardekoj ofte forgesis. » Tio ne estas la plej gravaj frazoj el la komento de Engholm. La citita paĝo povas esti tre instrua por tiuj, kiuj ĉagreniĝis pro la stato de la esperantistaro.

7. Ĉu ni esperantistoj estas kulpaj pro malfortiĝo de la movado, ĉar « ĉiam pli eĉ ni ne scias kaj ne komprenas pri la interna ideo » ? Kiom da novuloj iom aŭdas pri la interna ideo ? Se oni ne instruis iun pri la afero, oni ne riproĉu lin pro lia nescio koncerne tion. Tamen mi ne kredas ke la interna ideo tiom malaperis el la esperantismo, malgraŭ tio ke oni malmulte skribas kaj parolas pri ĝi. Ĝi troviĝas esence en la lingvo kaj la esperantismo.

8. Al la demando, ĉu ne estas malĝojige ke oni deklaris ke ni devas pli atentigi pri la praktika flanko, mi povas respondi nur, ke tia deklaro vere ne malĝojigas min.

Mi ofte miris ke tiom multaj sentas kontraston inter idealisma kaj praktika. Ĉu la esprimo praktika idealismo povas konjektigi ke ĉi tie kaŝiĝas miskompreno ?

Ne neglektante la valoron de la interna ideo por la ĝisnuna esperantismo mi tamen opinias ke ĝi estas estiminda nur se ĝi alportas rezultojn. « Per la fruktoj oni konas la arbon. » Certe la esperantismo respondas al celado de tutmonda frateco, sed tio ne povas resti nur sento. Tio devas montriĝi en praktikaj

(daŭrigo p. 2)

Someraj kursoj en « Oolgaardthuis »

PROZE...

Sidiĝante kelkajn horojn post la ferma kunsido de la de Fl.L.E. kaj L.E.E.N. en « Oolgaardthuis (Arnhem) aranĝitaj someraj kursoj por verki raporton pri la lecionoj kaj la diversaj okazintaĵoj en la ĵus forfluginta kurssemanjo, mi havas tiom da impresoj en mia cerbo, ke ŝajnas al mi preskaŭ necble, rakonti ĉion en la relative malgranda spaco, kiun la redaktoro disponigis.

Sonas en miaj oreloj ankoraŭ la seriozaj, kelkfoje eĉ solenaj vortoj, parolitaj en la ferma kunsido de s-ino M. A. v. d. Wal-Brethouwer, s-ro d-ro Th. v. Gindertaelen kaj s-ro C. B. Zondervan kaj la solena finkanto (« La Espero ») ; vere inda fino de sep agrablaj tagoj en Esperantujo. Komprenoble kaj feliĉe oni ne ĉiam estis seriozaj ; multfoje la gekursanoj kune kantis kaj — ankaŭ dum la lecionoj — kune ridis. Al la gajeco multe kontribuis nia germana amiko s-ro A. Weide el Hamburgo, kies provizo da anekdotoj, speciale pri fiŝkaptado, estis neelĉerpebla. Krome li montris sin bonega kursvidanto, kiu en sia konversacia kurso paroligis eĉ timemajn komencantojn. En alia kurso por komencantoj, s-ro d-ro Th. v. Gindertaelen klarigis multajn gramatikajn malfacilaĵojn. S-ino M. A. v. d. Wal konigis al granda grupo da geaŭskultantoj la belecon kaj gravecon de la Esperanto-literaturo kaj en seminaria kurso la sperta instruisto s-ro C. B. Zondervan donis multajn utilajn konsilojn al la ĉeestanta Esperanto-geinstruistaro.



Paŭzo — Pozo — Ridetanta Prozo !

Inter la ĉirkaŭ 80 partoprenantoj troviĝis dekduo da eksterlandanoj el Belgujo, Germanujo, Svisujo, Danujo kaj Svedujo. « Oolgaardthuis », kiu belege situas ĉe la Rejnborde en la okcidenta kvartalo de Arnhem akceptis ĉiujn gastame. Komprenoble la urbo Arnhem, ĉirkaŭita de belegaj parkoj, arbaroj kaj erikejoj estas pli taŭga por someraj kursoj ol la izolita vilaĝeto Kerk-Avezaath, sed en « Oolgaardthuis » oni devas kalkuli kun la rajtoj de aliaj gestoj kaj ne estas « inter si ». Tie aŭdiĝas ĉiaj lingvoj. Tamen tio havas bonan flankon : multaj el la aliaj gastoj pro nia vigla kaj flua konversacio interesiĝis pri Esperanto kaj i.a. s-ro A. Weide lertmaniere faris propagandon. Espereble tiuj semoj donos bonan rikolton.

Mi apenaŭ bezonas rakonti pri la ekskursoj al « Subĉiela Muzeo », « Park Rozendaal » kaj « Hoge Veluwe ». Ĉiu, kiu iam pasigis sian libertempon en Arnhem, konas tiujn vidindaĵojn. La ekskurso al la ekspozicio « Meĵloŝtono 1950 » en la urbaj parkoj Sonsbeek kaj Zijpendaal estis instrua sed tre laciga kaj mankis la tempo por bone rigardi ĉion. Same instrua kaj laciga estis la vespera ekskurso al la rekonstruata granda preĝejo, kie nia kompetenta samideano Valk gvidis la societon.

Pri la ceteraj aranĝoj la jenon : En la interkontiĝa vespero okazis diversaj salutparoladoj kaj ges-roj Hüsken-Reuderink ĝuigis nin per belega violonmuziko kaj kantado. Vendredon ni enpense faris vojaĝon al Japanujo kun f-ino Tusveld el Hago, kiu rakontis pri la tiea familia vivo, kantis japane kaj aŭdigis gramofondiskojn. Sabaton s-ino Mollinger-Hamaker el Wageningen pere de lumbildprelego gvidis nin al Jeruzalemo. Dimanĉon ni kun granda interesiĝo aŭskultis paroladon pri lingvistiko de nia samideano d-ro Manders el Venlo. Mardon d-ro v. Gindertaelen faris interesan paroladon pri la mizero en Hiroŝima post la falo de la atombombo kaj post la paŭzo la konata aktorino s-ino R. Köhler-van Ghelder pruvis, kiom bele sonas Esperanto deklamata.

La adiaŭa vespero dank' al la kunlaboro de multaj samideanoj bonege sukcesis. Ĝi estis sinsekvo preskaŭ senfina de muziko, kantado, deklamado, teatraĵetoj, cerbo-gimnastiko, k.t.p. S-ro F. Weeke en nomo de ĉiuj dankis la gekursgvidantojn kaj enmanigis al ĉiu el ili memoraĵon. Ankaŭ li mem ricevis donacon pro sia gvidado de la matengimnastiko.

G. H. H. v. Zeyl.

VERSE...

PRIARNHEMAJ RIMIMPRESOJ

Pentrinda Gelderlando
kun tagoj sen viando.
Arnhemo la juvela
kun « Oolgaardthuis » abela,
marmota kelkfoje.
Deĵoro zuma... ĝoje,
(terpom' senĝermigita) ;
Noktpordo nefermita...
Dormado ĉiel frata.
Babilo ege glata,
esprimofort' kapabla,
balbuto tre agrabla.
Ekskursoj plensukcesaj.
La kursoj interesaj :
pri Esperant-logiko,
sekreta gramatiko,
literatureluro (1)
aŭditaj kun plezuro.
« Skandalaj » paroladoj (2)
Braklongaj « kamaradoj » (3)
Junuloj ne tre multis,
do amo ne tro stultis.
Holanda seriozo
kun fin-metamorfozo.
La Flandroj kiuj mankis,
La koroj kiuj sangis
sur la disig-allaro :
« ĝis la venonta jaro ! »
Gratulojn Zondervano,
vi estis ne tirano,
sed via vera nomo :
DIKTAT kun la aldono
por la edzin' de ORO !
Subskribas el la koro :
TYNEVERUM.

(1) Poeta « licenco ». — (2) i.a. pri la pulo. — (3) La karpoj de Weide.

DANKO-VORTOJ

I
Sinjorino de la Bordo,
Tenas nin en literatura ordo
Dolĉavoĉe ŝi nin gvidas tra l'arbar'
de la esperantista verkarbar'
— Ho, ekzamen' inkubo ! —
Sed pri tio ne ekzistas ia dubo :
Pri la neces' konvinkis ŝi eĉ min !
Kiu do estas tiu sorĉistin' ?

II
Due : nia sinjoro Sen De
Jen ! li ekstaras ! Ho ve,
Senkompatate li disdonas la deĵoron,
— Kaj al ni akceptigas la honoron !
Kiu do estas tiu potenca sinjoro,
Tiu tamen al ni kara diktatoro ?

III
Sinjoro Herbejo
Logas ĉiujn al la lernejo ;
Ridegoj eksplodas,
Murojn skuegas !
Ridante instruas li,
Ridante lernas ni !
Kiu do tiu tutbonkora
Nevenkeble bonhumora
Sinjoro Herbej' ?

IV
Sinjoro Jena Valo en la lasta strofo :
Ĉu lin timigis triobla katastrofo ?
Ho, tute ne ! Same lerta lingvistikisto
Kiel li ankaŭ estas pingpongisto
Li eligis vortojn bomb-rilate,
El Esperantujo' nin vekis senkompatate,
Ho, sinjoro Jena Val' !
Al ĉiuj kvar ni dankas multon,
Nun ni prizorgu la daŭran rezulton !
S-ino Mollinger.



Ĉu rozoj inter dornoj (aŭ inverse) ?
La viktimoj — geinstruistoj : s-ro Weide,
s-ino v. d. Wal, geedzoj Zondervan kaj
d-ro T. Van Gindertaelen. Serioza prozo !

OBSERVOJ

LA STUDANTO

ĈU NI ESTAS
RIPROĈINDAJ ?
(daŭrigo de p. 1)



IOM DA INSTRUO.

En la julia numero de la allogo eldonita «Voĉo de Islando», la organo de la Federacio de Islandaj Esperantistoj, ni legis: «En Belgujo loĝas bona popolo, sed bedaŭrinde ĝi ne posedas ian memstaran, propran lingvon».

Kiom granda, malgraŭ Esperanto, restis la mondo kaj kiom malmulte scias unu popolo pri la alia!

Ni instruu la Islandanojn korektante la koncernan frazon: «En Belgujo loĝas DU bonaj popoloj, ĉiu posedas memstaran, propran lingvon».

PIK.

ETATISME ?

Vanwege de Hongaarse Nationale Dienst voor Toerisme (adres: Hungara Nacia Oficejo por Turismo, Bob-Utca 75/81, Budapest VII) ontvingen we een prachtbroschure in offsetuitvoering over de bezienswaardigheden van Hongarije met uitvoerig commentaar in het Esperanto. Anderzijds bereikt ons uit betrouwbare bron het bericht dat de Esperantobeweging in Hongarije verboden werd... Tussen de twee wereldoorlogen kende Hongarije een intens Esperantoleven en was Budapest een brandpunt van bedrijvigheid op gebied van letterkundige prestaties in het Esperanto.

ESPERANTO IN DIENST VAN DE WETENSCHAP

In Japan hebben 85 wetenschapsmensen (w.o. 68 Universiteitsprofessoren waarvan 2 Rectoren) besloten jaarlijks minstens één dissertatie in het Esperanto te publiceren en bij wetenschappelijke publicaties in andere talen steeds een résumé in de internationale taal te voegen. In het manifest dat deze geleerden dienaangaande lieten verschijnen heet het, dat wetenschappelijke vorsingen onmiddellijk wereldkundig moeten worden gemaakt en nieuwe uitvindingen niet één land maar geheel de mensheid moeten ten bate komen.

«ESPERANTO WINT VELD» is een uitstekend geïllustreerd propagandabladd waarvan de oplage tot 65.000 ex. reikt. Onderhandelingen zijn aan gang opdat het een uitgave zou worden van de esperantistenverenigingen die in het nederlandse taalgebied samenwerken.

«ESPERANTO» IN DE GROTE W.P. In band XIII (EHE-FRA) van de grote Winkler Prins Encyclopaedie zijn vier kolommen gewijd aan «Esperanto». Het wil ons voorkomen dat G. P. De Bruin, rekening houdend met de hem veeleer karig toegemeten ruimte, zijn uiterste best heeft gedaan om een objectief overzicht te geven van Esperanto, -taal en -beweging. Al de in Nederland bestaande Esperantistenverenigingen en de Vlaamse Esperantistenbond worden met name genoemd. Onder «Wereldtaalen» en «Zamenhof» zal Esperanto andermaal ter sprake komen.

NOORSE ESPERANTISTEN OP BEZOEK.

Aan een groep Noorse Esperantisten op doortocht door Nederland en België viel een warm onthaal te beurt te Brussel waar ze, als dankbetuiging, in het prachtige décor van de middeleeuwse Grote Markt, in schilderachtige nationale klederdracht, Noorse volksdansen, begeleid met klokkenspel, uitvoerden.

DE INTERNATIONALE JEUGDHERBERGDAG

nadert en het wordt traditie dat in de jeugdherbergen op die dag de internationale betekenis van het jeugdherbergwerk door een of ander spreker wordt belicht en de avond wordt besloten met samenhang van volks- en trekkersliederen uit alle landen. Uitstekend! Maar de dag dat dit in iedere jeugdherberg voor een internationale gezelschap zal gebeuren en in de internationale taal zal deze, overigens zeer verdienstelijke beweging, niet weinig prat mogen gaan op haar prestaties. Daarom kunnen we kwalijk begrijpen dat nog niet alle jeugdherbergleiders het nut hebben ingezien van het Esperanto, dat de kroon op hun verdienstelijk streven kan betekenen en het nog houden bij het surrogaat van een vermeende veeltaligheid die immer tekort schiet.

FAK-ESPRIMARO FERVOJISTA apertas laŭ enciklopedia maniero sur apartaj klasigitaj folioj; la kajero 216 de «La Interligilo» entenas la unuajn foliojn (F-LOK. Lokomotivoj) I. Tiu deziro de la fervojisto realigas en la kadro de monda Ligeco fare de «Internacia Ligo por Esperanto en Poŝto, Telekomunikoj kaj Transportoj». Informojn donas: INTERLIGILO, 46, rue Lamartine, Paris (IXe), Francujo — Aldonu resp. kuponon!

Uitwerking van de opgaven in het vorige nummer:

1. Sinjorino Boras estis irona vagonare al la urbo por aĉeti novan ĉapelon. 2. Ŝi petis sian edzon doni al ŝi monon por tio. 3. Ridetante ĉi tiu plenumis sian peton kaj metis bankbileton de dudek kvin guldenoj sur la tablon. 4. Tri kvaronhorojn poste ŝi jam sidis en la vagonaro. 5. Ŝia sola (niet: nura) kunvojaĝantino sidis en anguleto ĉe la fenestro kaj iomete dormetis. 6. Sinjorino Boras trovis la kupeon tre varma kaj post kelka tempo ŝi metis siajn (meervoud!) libron kaj mansaketon sur la benkon kaj foriris momenton por iom refreŝigi sin. 7. Kiam ŝi revenis en la kupeon ŝi malfermis sian saketon kaj vidis sian monujon malfermita. 8. La bileto de dudek kvin guldenoj estis for. 9. Sinjorino Boras paliĝis pro ektimo; ĉie ŝi serĉis, sed ĉio estis vana. 10. Sur la alia benko ankoraŭ ĉiam sidis la alia sinjorino kaj trankvile dormis. 11. Sed subite sinjorino Boras pripensis: «Ĉu ŝi eble estus vekiginta kiam mi estis for?». 12. Tiam ŝi vidis la mansakon de la dormantino kusaŭta sur la benko. 13. Sinjorino Boras hezitis momenton, sed tamen ŝi kaptis tiun sakon. 14. Kaj jen, inter kelkaj leteroj... ŝi trovis bankbileton de dudek kvin guldenoj. 15. Guste kiel ŝi pensis! Ŝi metis la monon en sian propran saketon kaj demandis al ŝi, ĉu ŝi avertos (avertu) la policon. 16. Sed ne, nun kiam ŝi rehavis sian monon, ŝi estis kontenta. 17. Posttagmeze, kiam ŝi venis hejmen kun sia nova ĉapelo, ŝi trovis sur la tablo... la bankbileton, kiun ŝi forgesis kunpreni!

La hundo bojas. La porko gruntas. La grilo ĉirpas. La abelo zumas. La kato miaŭas. La rano kvakas. La bovo muĝas. La serpento siblas. La kolombo kverkas (rukulas). La kikonio klakas. La muso pepas. La virkoko kokerikas. La ĉevalo henas. La lupo hurlas (ululas). La korvo grakas. La kokino klukas. La fiŝo silentas.

La rezultato superis miajn atendojn. Liaj genuloj fleksiĝis. Refaldi (suprenfaldi) la manikojn. Malfermi la pordon en plena larĝo. Mi ne retenos (ĝenos) vin. Laboro kondukas al oro kaj gloro. Sendi ion por elekto. Nutri la esperon. Bezonu leĝon ne obeas. Konfuzi ies kapon. Malvaste loĝi. Multvojaĝinta viro. Ĝena silento. Lernoservi ĉe iu. Jeti bastonon en la radon. Supereca rideto. Ekzerco donas kapablon. Mielkuka lando. Okazo kreas ŝteliston.

1. La kunveno ĝuste estis komencigonta kiam policano envenis la salonon kaj arestis la parolonton.
2. Se mi havus sufiĉe da kuraĝo por paroli Esperanton, mi certe vizitus la kongreson, ĉar mi scias ĉiujn ekzercojn el mia lernolibro parkere.
3. Per konvinka parolado li sukcesis akceptigi lian proponon.
4. Sajnas al mi necese, ke vi diru la veron.
5. Ĉion bone konsiderinte, mi kredas, ke tamen vi pravas.
6. Mi ŝuldis al li dudek unu frankojn kaj tial donis al li unu kaj duonan guldenojn, ĉar unu guldeno havas la saman valoron kiel dek kvar frankoj.
7. Li petis min, ke mi helpu lin, sed al mi mankis la tempo fari tion.
8. La ŝlosilo ne plu estis uzebla, ĉar ĝi estis tute rustinta.
9. Tiu substanco estas tre venena; milono de tiu kvanto povas kaŭzi la morton.
10. Plena de kuraĝo la vicepresidente anstataŭanta la prezidanton dum lia malsano komencis sian taskon.

Vorto - Scio - Respondoj: Torako: b. Putoro: c. Barĉo: b. Eskarpo: c. Semantiko: a. Sepalo: b.

Anstataŭigu la streketojn per verboj, indikantaj ian sonon:

Dormantoj kelkfoje —; dormemaj personoj ofte —; Publiko, montranta sian aprobon — sed se ĝi estas malkontenta, ĝi —; kolera personoj ofte — per la dentoj; facila venteto — inter la arboj; pro subita ekscito de la nazaj nervoj oni —; malvarmumintaj personoj ofte — la akvo — sub la remiloj; per vipo oni povas —; ploranta persono ofte —; kanoj —.

Vertaal:

1. Nog nooit heb ik zoveel pret gehad als de laatste winter. 2. Ofschoon het erg koud was, ging ik toch iedere dag schaatsen; ik had 'n paar beste schaatsen. 3. Ik wil niet zeggen, dat ik een sterben op dat gebied, maar ik kan mij op het ijs zeer goed vermaken. 4. In landen waar het nooit vriest, kunnen de kinderen zich niet voorstellen, dat men in Nederland, Denemarken, Zweden, enz. op het water kan lopen. 5. Toch ben ik altijd zeer blij wanneer de winter voorbij is en de lente het land weer komt verfraaien. 6. Dan gaan wij naar de streken waar de bloembollen hun fraaiste bloemen ten toon spreiden. 7. Daar bewonderen wij de gele narcissen; de rode, gele en witte crocusen, tulpen en hyacinten. 8. Maar er gaan ook miljoenen bloembollen naar het bui-

tenland, en die handel brengt naar ons nu zo arm Nederlandje heel wat deviezen. 9. In andere provincies zijn het de fruitbomen, die de toeristen trekken, wat onze hotelhouders en winkeliers gaarna zien. 10. Ik vraag U: «Waarom willen sommige mensen hun vakantie altijd in andere landen doorbrengen, terwijl ons eigen land veel bezienswaardige plekjes biedt?»

ADVERBAJ PARTICIPOJ

En Esperanto adverbaj participoj estas ofte uzataj, ĉar oni ja povas malpezigi sian stilon, anstataŭigante per ili dependajn propoziciojn, plej ofte tempajn propoziciojn komencigantajn per dum kiam, post kiam kaj antaŭ ol, sed kelkfoje ankaŭ kaŭzajn, koncedajn kaj kondiĉajn propoziciojn, komencigantajn resp. per ĉar, kvankam kaj se.

Kelkaj ekzemploj: Sidante sur kesto (= dum kiam li sidis sur kesto) li skribis la leteron; salutinte nin (= post kiam li salutis nin) li forlasis la salonon; forvojaĝante (= antaŭ ol li forvojaĝis) li adiaŭis ĉiujn gekonatojn; dezirante sukcesi (= ĉar li deziris sukcesi) li forte laboris; povante ripozii (= kvankam li povis ripozii) li tamen laboris; Nur streĉante ĉiujn viajn fortojn (= nur se vi streĉas ĉiujn viajn fortojn) vi povos atingi tiun celon.

En ĉiuj ĉi supraj ekzemploj la subjektoj de la ĉefa kaj dependa propozicioj estas identaj kaj nur se ili estas tiaj, oni povas uzi la adverbajn participojn. Absoluta participo ne ekzistas; ĝi ĉiam rilatas al la subjekto kaj pro tio la «klasika» frazo «enfermite mi sendas al vi poŝtmarkon por via respondo» nepre estas erara traduko de «ingesloten zend ik U een postzegel voor antwoord». «Ingesloten» ja ne rilatas al la subjekto «ik». Samspeca eraro troviĝas en la nederlanda frazo «na enkele liedjes gezongen te hebben bracht de autobus de kinderen weer naar huis». (Generale aŭtobusoj ja ne kantas!) Tradukante tiajn frazojn oni do esploru, ĉu en la nederlanda frazo la participo rilatas al la subjekto de la frazo. Tradukante la frazojn: «Ĵs en weder dienende ga ik Zondag op schaatzen naar A.» kaj «gesloten zijnde gelieve men bij de buren te bellen» oni do ne povas uzi adverbajn participojn. Tradukante «alles wel beschouwd geloof ik, dat hij gelijk heeft» kaj «de ogen ten hemel gericht sprak hij...» oni povas uzi la adverbajn participojn, sed ofte oni uzas en tiaj frazoj anstataŭ aktivan participon, erare pasivan, kiu tamen ne rilatas al la subjekto de la ĉefpropozicio. Korektaj do estas jenaj tradukoj: «ĉion bone konsiderinte, mi kredas ke li pravas» kaj «turninte la okulojn al la ĉielo li diris...». Ofte ekzamenkandidatoj senskrupule aprobas jenajn frazojn: ne havante almetojn estis al mi pro la mallumo neeble legi la nomon sur la pordo» kaj «sidiĝinte antaŭ la skribotablo por verki miajn impresojn ŝajnis al mi tre malfacile plenumi tiun taskon». Unuavide la subjekto de ambaŭ ĉefpropozicioj ja ŝajne estas «mi», do la subjektoj de la ĉefa kaj dependa propozicioj ŝajnas identaj, sed analizante la frazojn oni baldaŭ konstatas, ke la subjektoj de la ĉefpropozicio estas resp. «legi la nomon sur la pordo» kaj «plenumi tiun taskon».

Provu vian vortscion kaj elektu la ĝustan difinon de jenaj vortoj, ne konsultante vortaron:

Spado estas a) mineralo, b) armilo, c) speco de fosilo.

Referenco estas a) rekomenda atesto, b) respekta gentila kliniĝo, c) fizika fenomeno.

Enfilii estas a) tranĉi fiŝon en pecojn kaj elpreni la ostojn, b) enkudriligi fadenon, c) milita termino.

Selakto estas a) elekto kun la celo plibonigi rason, b) gumo de arbo kreskanta en Hindujo kaj uzata multe en elektro, c) acida fluaĵo restinta el la lakto post apartigo de kremo kaj kazeo.

Kaporo estas a) neologismo, egalvalora al «barburo», b) arbeto kies burĝonojn oni uzas kiel spicaĵon, c) remaĉula dombesto.

Uitwerkingen van Vlaamse cursisten voor 20 September aan V.E.B., Studanto. postbus 342, Brussel; van Nederlandse cursisten aan A. J. Kalma, Stadionkade 6, Amsterdam-Z.

Cursusleiders

Voor Uw cursus in September beschikken wij over een nieuw Boek: Prijs 30 bfr. f. 2,25

Gans nieuwe bewerking van het Witterijck-leerboekje. Veel meer uitleg! De schrijver ontving reeds lovende recensies van de grootste autoriteiten op Esperanto-gebied!

Wendt U tot: Flandra E.-Instituut, Blankenbergsteeweg 72, Brugge.

bonfaroj: prosperigo de kulturaj gazetoj en Esperanto, tradukado de ĉiuspecaj libroj en Esperanto, interŝanĝo de sciencaj sciindajoj per Esperanto, komercaj rilatoj per Esperanto, k.t.p. Estas superflue multon diri pri tiu afero; praktikaj idealistoj inter ni laboris jam dum multaj jaroj por tio.

9. Kion signifas la admono ke ni reiru al la konceptoj de Zamenhof? Zamenhof vivis en tempo alia ol la nuna. Intertempe nia movado progresis kaj la mondo plu evoluis. Multaj aferoj ŝanĝiĝis. Aliaj novaj aperis. Ni progresis ankaŭ dank' al la heroa laboro de Zamenhof. Ne tiom liaj opinioj kaj scioj estu niaj gvidantoj, sed pli liaj fido, persisto, honesto, toleremo, sindediĉo.

10. Ankoraŭ unu rimarkigo. Generale oni ne konvinkas kaj plibonigas homojn per riproĉoj. Tre ofte tio naskas nur senton malplaĉo en la riproĉitoj. Riproĉantoj oni «faras negativan laboron». Oni sir demandu, ĉu laŭ saĝo kaj morale oni tiom superas la ĝeneralan nivelon ke oni rajtas riproĉi.

K. Wilgenhof.

PORTU VIAN INSIGNON!

Portante la verdan stelon mi propagandas, tute trankvile kaj senpene, por nia idealo. Eble vi deziras esti modesta kaj vivi nerimarkite, kaj vi ne volas esti promenanta reklamŝildo. Mi bone konas tion. Kaj tial okazis iam al mi, ke mi elbutontruigis la stelon, kiun mi tiel feliĉe tien fiksis en antaŭa, pli oferpreta momento. Sed kedu nur: ne longe daŭris, kaj la bona amiko, la modesta kaj praktika propagandisto, reaperis sur la veston, kaj denove ĝi sentime parolas. Ĝi certe tiras la atenton, kaj tio estas tute en ordo.

Pripensu, ke generale ni, gebatalantoj por la verda idealo, ne ankoraŭ estas milionuloj, kaj ke niaj unuigoj ne povas elspezi gravajn sumojn por propagandi en la gazetaro, en la filmejoj, kaj per la ondoj de la radio. Estas bedaŭrinde, sed estas fakto. Tamen ankaŭ fakto estas, ke la simpla monrado de niaj verdaj steloj, (de ĉiam pli da verdaj steloj, karaj miaj) atestas antaŭ la okuloj de granda publiko, dum vojaĝo kaj en la ĉiutaga laboro: Esperanto vivas! Kaj ĝi volas (kaj povas) kontribui al la feliĉo de la mondo, se nur la mondo volas atskulti kaj almenati esperi la asertojn de la Esperantistoj, se la homoj nur volas aŭdi la ankoraŭ ĉiam vokantan voĉon de la modesta kaj eminenta amiko de la homaro: Doktoro Zamenhof.

Pri kelkaj spertoj de stelportanto ni esperas rakonti iom alian fojon. Do ĝiz tiam!

Peono.

Ruzuloj kaj Kontraŭruzuloj.

Verdire la surskribo pli ĝuste nomiĝus: Ruzulinoj kaj Kontraŭruzulinoj. Temas ja pri ina ruzeco... dudirekta. Nur aŭdu!

En niaj universitat-urboj la altlernejoj rilatas kaj influas tre diverse la vivon de la urbanoj (kaj urbaninoj). Tiel estas butikoj, kiuj grave profitas pro la alesto de la universitata popolo. La sinjoroj profesoroj kiel la studentaro bezonas la aĵojn kiajn aĉetas ankaŭ la aliaj samurbanoj, sed krom tio ankaŭ specialajn librojn kaj revuojn. Kompreneble la kafejoj havas sian parton el la profito, kaj la studentoj deziras propran klubojn, — nuntempe eĉ du, unu por viroj, la alian — por inoj. Pli urĝa tamen estas persone ekhavi bonan hejmon, taŭgan pensionon. Feliĉe ekzistas personoj, kiuj komprenas same tiun bezonon de la studentoj kaj la eblecon perlabori sur tiu tereno sian ĉiutagan panon. Kompreneble estas speciale la vidvinoj kaj fraŭlinoj, kiuj preferas ke inaj studentoj luu ŝiajn ĉambrojn. Pri unu el tiuj porinaj pensionoj mi ekaŭdis pri kuriozaj ruzoj inter la mastrino kaj siaj klientoj.

Kvankam grandparte la studentinoj ne multe interesas pri la mastrumado, kelkaj tamen montras, ke ili alte taksas almenaŭ kontroli kvazaŭ ĉefoj la laboron de la mastrino. Pro tio ili jetas pecojn de blankaj fadenoj sur la planktapison. Se poste ili retrovos la fadenojn, evidentigos ke la ĉambro ne estas dece purigita. Sed... la mastrino ankaŭ estas ino, do ne tute senruza. Kaj do okazas, ke Sinjorino Mastrino ordonas al la servistino: «Hodiaŭ ni ne havas sufiĉan tempon por taŭga purigado, do nur forprenu la fadenpecojn.» Kaj... vivas kontente kaj feliĉe kiuj kontrolis same kiel la kontrolitoj.

Nora Daver.

NED. ESPERANTISTEN-VEREN. « LA ESTONTO ESTAS NIA »

Alg. Secretariaat, schr. cursus voor beginners en uitleendienst : Mr. A. J. Kalma, Stadionkade 6, Amsterdam-Zuid, Tel. 96160. Penningm. : P. M. Mabesoone, Pythagorasstr. 122, Amsterdam-O. Postr. 34563. Boekendienst : H. A. Appel, Z.O.-singel 5, Bergen op Zoom, postrek. 76915. Bibliotheek : E. A. Koot, Joh. de Meesterstraat 12, Utrecht. Propaganda-dienst : H. Bakker, Van Tuylplein 33/1, Amsterdam-Zuid, tel. 95320. Schr. cursus v. gevorderden, examen B: H.A.Appel, Z.O.-singel 5, Bergen op Zoom. Alg.Ned.Esp.Examen-comm.: Mej.H.M.Mulder, Zilvermewstr. 29, Badhoevedorp Cefdel. U.E.A. : P. Moen, Schaarbergenstraat 104, Den Haag, postrek. 79167.

KOMUNIKOJ DE LA ĈEFESTRARO

ESPERANTO-EXAMENS

De najaarsexamens voor diploma A en B vinden plaats op Zaterdag 4 November te Utrecht. Aanmelden tot 23 September bij de secretaresse van de examencommissie, mej. H. M. Mulder, Zilvermewstraat 29, Badhoevedorp. Prospecti gratis verkrijgbaar bij bovengenoemd adres en bij de alg. secr. van L.E.E.N.

PROPAGANDA

Natuurlijk hebben onze actieve afdelingsbesturen hun plannen voor een uitgebreide propaganda-actie in het komende seizoen al gereed. Even belangrijk als de propaganda naar buiten is de «inwendige zending», het samenstellen van afwisselende en interessante programma's voor de afdelingsbijeenkomsten, die er op gericht moeten zijn, de leden zoveel mogelijk gelegenheid te bieden het Esperanto praktisch toe te passen. In dit verband wijzen we nog even op de door N.C.K.E. aan alle afdelingen verzonden circulaire betreffende een tournee van de Egyptenaar Tadros Megalli door ons land. Men plege hieromtrent overleg met de plaatselijke afdelingen van de andere bij N.C.K.E. aangesloten bonden. Het alg. secretariaat beschikt over verschillende brochures en geschriftjes omtrent het organiseren van afdelingsbijeenkomsten, cursussen, enz., tal van sketches en toneelstukjes, lichtbeelden over Nieuw-Zeeland en ander materiaal, om de taak van de afdelingsbesturen te vergemakkelijken. Ook hebben wij een complete Linguaphone-cursus. De huurprijs van deze uit 15 dubbele grammofoon platen bestaande cursus, door de gebruiker in Amsterdam af te halen en terug te bezorgen, bedraagt slechts fl. 5, per maand. Nogmaals verzoeken we competente sprekers dringend zich beschikbaar te stellen voor propaganda-avonden en het houden van lezingen in andere afdelingen en zich daartoe op te geven bij de secr. van N.C.K.E. de heer J. Pouli, Elegaststraat, 19 hs, Amsterdam-W.

Naast cursussen voor beginners worden natuurlijk conversatiecursussen en vervolgcursussen georganiseerd. Omtrent studiemateriaal plege men tijdig overleg met de leider van onze boekendienst, die U gaarne van advies zal dienen.

Wijs Uw kennissen, die niet in de gelegenheid zijn een mondelinge cursus te volgen, maar toch Esperanto willen leren, op onze uitgebreide schriftelijke cursus (20 gedrukte lessen), die inclusief individuele correctie slechts fl. 8,50 kost. Prospecti zijn ter verspreiding gratis verkrijgbaar bij de alg. secretaris; bovendien zenden wij aan serieuze belangstellenden gaarne een proefles. N.C.K.E. heeft in het formaat van de bekende « sleuteltjes » een handig en overzichtelijk geschriftje laten drukken « Esperanto, wereldhulptaal » (16 blz.), geheel « up to date », dat in een 13-tal artikel-tjes een antwoord geeft op vragen als « Wat is Esperanto ? », « Hoe ziet Esperanto er uit ? », « Waarom geen Engels of Latijn ? », en tal van inlichtingen bevat over de verspreiding van Esperanto, de praktische toepassing op velerlei gebied, de invoering bij het onderwijs, enz. Op de laatste pagina zijn de adressen van de bij N.C.K.E. aangesloten organisaties vermeld. De prijs van deze oorspronkelijk in het Engels geschreven en door « The National Education Association » (U.S.A.) uitgegeven brochure, die reeds in verschillende talen is vertaald, bedraagt, zolang de voorraad strekt, slechts fl. 0,03. Sluit een exem-

plaar in bij Uw brieven aan niet-esperantisten! Voorts leveren wij zolang de voorraad strekt onze affiche « Gaat met Uw tijd mee; leert Esperanto » met groene ster en ruimte voor eigen aankondigingen van tentoonstelling, openbare avond, proefles, cursus, enz. tegen zeer sterk gereduceerde prijs, nl. 10 ex. fl. 0,25; 50 ex. fl. 1,15 en onze propaganda-ansichten « Als de tolken staken... » 4 stuks fl. 0,10; 100 ex. fl. 2,25. Ook van de brochure « Richtlijnen voor het onderwijs van Esperanto » (fl. 0,05; 10 ex. fl. 0,40; 25 ex. fl. 0,75) hebben wij nog een beperkte voorraad. Alle prijzen zijn excl. porti; bestellingen aan onze boekendienst. Voor het luttel bedrag van fl. 1,— ligt ons blad een jaar lang ter inzage in openbare leesalen op lees tafels in grote instellingen, enz. Voor particulieren bedraagt de abonnementsprijs fl. 2,25. Reeds meermalen schreven we over de propagandistische waarde van « De Esperantist ». Hoe men door middel van dit blad afdelingsdonateurs kan werven vertelde de heer W. Weerheijm U al in het vorige nummer (rubriek: « Komunikoj de la ĉefestraro »). Aan alle afdelingsdonateurs voor wie de contributie à fl. 0,50 is voldaan, zullen de dit jaar nog verschijnende nummers gratis worden toegezonden. Nieuwe donateurs, voor wie de afdracht aan de alg. kas voor de rest van 1950 is vastgesteld op fl. 0,30, geve men zo spoedig mogelijk op aan de adm. A. E. Burk, Woestduinstr. 58, I, Amsterdam-West. Ook zij ontvangen gratis de nummers, die dit jaar nog zullen verschijnen.

LA HONORIGO DE S-RO BAAS

« Kara s-ro Baas, mi ne intencas supersuti vin per laŭdaj vortoj. Mi preferas uzi simbolon kaj kompari vin kun d-ro Zamenhof. Li laboris, batalis kaj venkis. Ankaŭ vi. Vi farigis prezidanto de nia organizo en tempo tumulta, sed per firmaj manoj vi tenis la bridojn de nia asocio kaj finfine vi venkis, ĉar L.E.E.N. dankas sian nunan kontentigan staton grandparte al vi. Por esprimi nian dankon pro via sindona laboro por L.E.E.N. sub grandparte malfacilaj cirkonstancoj, la komitato, dank' al la helpo de la membroj, povas nun donaci al vi ion, kio havas kaj personan karakteron kaj plenumis la deziron helpi vin en via laboro por la oficejo « Esperanto ĉe la Instruado ».

Jen proksimume la esenco de la paroladeto de s-ro Holleman dimanĉon la 17-an de junio okaze de la transdono de la donaco al s-ro Baas.

Nia prezidinto dankis s-ron Holleman per koraj vortoj kaj komisiis la komitaton transdoni lian dankon al la membroj de L.E.E.N. Volonte ni faras tion, aldonante ankaŭ nian dankon por la helpo, kiu ebligis al ni doni al s-ro Baas taŭgan kaj daŭran objekton. Eĉ de trans la limoj ni ricevis donacon; belga samideano alportis sian « ŝtonon ».

Vi kompreneble estas scivolaj en kia formo ni fandis nian dankesprimon al s-ro Baas. Jen. Dank' al la helpo de niaj membroj ni povis aĉeti belan praktikan skribotablon, tute laŭ la plaĉo de s-ro Baas, kune kun skribotabla lampo, por ebligi la direktoron de la « oficejo » ankaŭ vespere labori por nia komuna afero. Por la ĉefestraro ĉestis s-ro Mabesoone, kiun ni elektis en Groningen « observanto » el la ĉefestraro. Kun plezuro la komitato plenumis sian taskon kaj dankas la membrojn pro ilia konfido.

La komitato.

ATENTON!

La partoprenintoj en « Oolgaardthuis » sendu ekz. de fotoj, rilataj al la feria semajno, al mi. Mi faros tutan kolekton kaj sendos ĝin, en sept., al ĉiu interesato, kiu petos ĝin. Mi peros eventualan mendon. Ne skribu pri ĉi foto, ĉar tian peton mi ne povos plenumi. Antaŭdankoj! Adreso : s-ro H. Arends, Gravenstraat 16, Arnhem, Nederland.

VERDLANDO VOKAS (V - 29 - VII - 1950).

Listo de radio-dissendoj en aŭ pri Esperanto kaj informoj. Tempindiko laŭ M.E.T. (= mezeŭropa tempo) valida ankaŭ en Nederlando kaj dum la somero ankaŭ en Belgujo kaj la cetera okcidenta Eŭropo.

Mallongigoj : I = informoj. P = parolad(et)o. K = kurso.

Ciutago	16.00-16.15 Prago, 25,34 m., 31,41 m. : I. 19.45-20.00 Sofio, 39,11 m. : I kaj P. 22.00-22.30 Prago, 25,34 m. : P.
Dimanĉe	9.00, 11.00 kaj 13.00 « Nigra Stacio », 47 m. : Gram. 17.00-17.20 Romo, 16,9 m., 19,5 m., 25,2 m. : I kaj muziko.
Lunde	6.30- 6.35 Vieno, 25 m., 31 m., 41 m., 48 m., 513 m. : I. 8.15- 8.30 Sveda Radio, 49,46 m., 19,80 m. : I. 16.15-16.30 Sveda Radio, 27,83 m., 19,80 m. : I. 17.30-18.00 Rio de Janeiro, 375 m. : 30,71 m. : K. 22.50-23.00 Prago, 470 m. : I kaj P.
Marde	2.15- 2.30 Sveda Radio, 27,83 m., 19,80 m. : I. 12.55-13.00 Berno, 13,94 m., 31,46 m., 48,66 m. : P. de d-ro Arthur Baur. 18.40-18.45 Berno, 19,60 m., 31,46 m., 48,66 m. : Ripeto de la tagmeza elsendo.
Merkrede	0.45- 1.00 Gvatemalo, 49 m. : I. 18.00-18.20 Lille, 235 m. : P. (Nur ĉiudumerkrede : 19 VII k.t.p.). 20.15-20.30 Varŝavo III, 48,23 m. t I. 22.50-23.00 Prago, 470 m. : I kaj P. 23.00-23.45 Prago, 470 m., 315 m. : « La Verda Stacio » dissendas sian tre aŭskultindan artoprogramon !! (Nur la unuan merkredon de ĉiu monato).
Ĵaŭde	12.55-13.00 Berno, 13,94 m., 31,46 m., 48,66 m. : P. de d-ro Edmond Privat pri mondfederacio kaj mondpaco. 15.30-15.45 Graz (Alpland), 240 m. : K. de prof. Hainschegg. (Nur la unuan ĵaŭdon de ĉiu monato). 18.40-18.45 Berno, 19,60 m., 31,36 m., 48,66 m. : Ripeto de la tagmeza elsendo.
Vendrede	9.05- 9.20 Parizo, 48,39 m., 347 m. : K. 16.40-16.55 Vieno, 25 m., 31 m., 41 m., 48 m., 203 m. : I. (Nur ĉiudavendrede). 17.45-18.00 Hilversumo II, N.C.R.V., 298 m. : P. (Nur unufoje en 5 aŭ 8 semajnoj). 17.00-17.20 Romo, 16,9 m., 19,5 m., 25,2 m. : I kaj muziko.
Sabate	23.15-23.30 Hilversumo, K.E.O., 298 m. : I.

Informoj kaj petoj :

La sveda radio denove dissendas Esperantoprogramerojn. Vidu en ĉi-supra listo sub « Lunde » kaj « Marde ». Bonvolu aŭskulti kaj sendi dankokarton aŭleteron al : Sveda Radio, Stockholm 7 (Svedlando — Zveden). Prago duobligis la tempon de sia ĉiuvespera Esperanto-dissendo. Anstataŭ mallongigi aŭ ĉesigi sian Esperanto-programeron Prago duobligas ĝin : ĉiuvespere kompletan duonhoron ! Skribu al Ĉeĥoslovaka Radio, Esperantofako, Stalinova 12, Praha XII (C.S.R.). Informoj pri Esperanto-radio-elsendoj sendu ne nur la radio-stacioj, sed ankaŭ la radio-aŭskultantoj al : Radio-Servo N.C.K.E., Waltweg 3, Tjerkerwerd (Fr.), Nederlando.

DOKUMENTA SERVO
kio okazis en 1949 ?

BRITUJO

Pri Britujo bedaŭrinde mankas informoj, krom ĉi tiuj, ke ĉe la Foreign Office Language Society (Lingva Societo de la Ministerio por Eksterlandaj aferoj) okazis Esp-kurso por oficistoj, diplomatoj kaj oficiroj, ke la Brita Esperantista Asocio nombras pli ol 2000 membrojn kaj la laborista asocio SAT en Britio (SATEB) iom pli ol 200.

ĈEHOSLOVAKUJO

La Esperanto Asocio en ĈSR (Ĉeĥoslovakujo) aperigis presitan enhavoričan raporton pri 1948, kiu povus esti ekzemplo por aliaj asocioj! Tinn pri 1949 ni ankoraŭ ne ricevis. La membronombro estis en 1948 iom pli ol 3000. La enhavo de la gazeto Esperantista atestas pri vigla esperanto-vivo. Malhelpis neeble importi alilandajn esp-librojn, kaj malfacilaĵoj koncerne la eldonadon de verkoj esperantaj en Ĉeĥoslovakio mem. La 7-a Ĉeĥoslovaka Kongreso Esperantista en Liberec estis granda sukceso. Pli ol 600 personoj aliĝis. La Somerun Kolegion de Esperanto (Somerkurson) en Doksy partoprenis 246 kursanoj, inter kiuj 4 eksterlandanoj. Je 15.3.49 la nombro da pagintaj membroj estis jam 2626, el kiuj 901 estis novaj!

Subvencioj : 5.000.— Kĉs de la loka Nacia Komitato en Ostrava, 5.000.— Kĉs de la Nacia Komitato en Zilina, 15.000.— Kĉs de la Entreprena Sindikata Klubo en Svit, 2.500.— Kĉs de la Nacia Komitato en Hradec Kralove.

DANUJO

En la jarkunveno raporto de la Centra Dana Esperantista Ligo ni legas, ke la membronombro je majo 1949 estis 1294. (La antaŭan jaron 1078). La somerkursojn partoprenis 280 personoj el 10 landoj. Pli ol 1000 artikol(et)oj aperis en danaj gazetoj.

Oni planas la eldonadon de katalogo enhavanta la esp-literaturon, kiu troviĝas en danaj bibliotekoj kaj en la biblioteko de s-ro Neergaard. La Dana Biblioteka Esperanto Asocio nombris 300 membrojn.

FRANCUJO

Pri la membraro de la Unuiĝo Esperantista Franca (UEF) ni ne posedas ciferojn. La organo de UEF estas Franca Esperantisto. Ekaperis nova gazeto L'Esor de l' Esperanto, kvarpaĝa grandformata franclingva propagandilo, kiu versajne eliros kvaronjare. Alia grava eldonaĵo estas « Feuilles Encyclopediques de Documentation Esperantiste » (Folioj enciklopediaj por esperantista dokumentado), eldonita de s-ro Perret. Dokumentado estas grava afero por nia movado kaj tial estas bedaŭrinde, ke ĉi tiu publikaĵo, de kiu pretiĝis jam 9 kajeroj, aperas en franca lingvo kaj ne en Esperanto.

Bona propaganda entrepreno estis la prelega vojaĝo de prof-o Lapenna el Jugoslavio. Laŭraporte la vojaĝo daŭris 70 tagojn. Okazis 64 publikaj prelegoj kaj 7 radioprelegoj aŭ intervjuoj. Ĉirkaŭ 7.000 personoj aŭskultis la prelegojn; Aperis pli ol 100 diversaj anoncoj aŭ raportoj en la gazetaro. Estis multa kontakto kun gravaj personoj (profesoroj, urbestroj, scienculoj, k.s.). La SAT-Amikaro en Francujo agadis kiel kutime por pligi la membraron. Sed malgraŭ ĝia agado la membraro iom malkreskis. Komence de la jaro ĝi nombris 734 membrojn kaj en la fino 630. Espereble la SAT-kongreso efikis tiel propagande, ke novaj kursoj en la vintro 1949-50 nuligos tiun perdon.

GERMANUJO

La germana Esp-movado, malgraŭ la malfavoraj cirkonstancoj, rapide reorganiziĝis kaj la Germana Esperanto-Asocio nombris en aŭg. 1948 jam 8258 membrojn. Pro la monreformo kaj malplibonigo de la ekonomia stato ĝi perdis ne nur 20.000 germ. markojn, sed ankaŭ multe da membroj, tiel ke en la fino de 1948 restis nur 6797. En 1949 la membronombro malprogresis ĝis 4805 (oktobro); ĉi tio tamen ne malhelpis vigan agadon. Pri tio atestis i.a. ĝia dua kongreso, kun 776 partoprenantoj, inter kiuj 64 eksterlandanoj, kun interesaj paroladoj kaj multaj elmontroj de interesigo flanke de oficialaj personoj. Germanaj esp-istoj varbis la plej grandan kvanton da subskriboj por la petskribo = 517.310 individuaj kaj 6.808.969 kolektivaj. Organo de GEA La Ponto eliris dumonate; en 1950 monate. Krome monata propon. gazeto Esperanto-Post. Nombro da lokaj grupoj proks. 200; granda nombro da sekcioj (ne lokaj, sed fakaj), i.a. katolika (proks. 1500 membroj), evangelia, junulara, virina, gepatra, instruista, inĝeniera, fervojista, SATana, UEAana, ULana laboras sur speciala tereno. Atinĝoj : stariĝo de Esp-Infoformo ĉe la Berlina Komunumo, agnosko de la valoro de Esperanto ĉe la Poŝto kaj la akcepto de Esperanto kiel nedeviga fakoj en la lernejoj de Grand-Berlino. Subvencioj : dufoje 1000 markoj de la Kultministerio de Malsupra Saksujo, 1000 markoj de la Kultministerio de Bavarujo, 500 markoj de la Kultministerio de Viremburgujo, 250 markoj de la Magistrato por Klerigado en Okc. Berlino.

G. P. De Bruin

Niaj Esperanto-Enigmoj kun premioj

PREMION akiras por VEB post n-roj 87-88 : F-ino Popelier, St., el Blankenberge (93 p.), kaj por LEEN : F-ino J. v. Eeden el Putten.

SOLVOJ

N-ro 89. *Horiz.* 1. tavolo ; evaku. 2. iris ; bu ; eluz. 3. te ; turnir ; lu. 4. ont ; nigr ; mir. 5. raŭk ; ili. 6. kal ; idili. 7. elekt ; tir. 8. enu ; karo. 9. lag ; park ; nap. 10. eni ; perant ; de. 11. geni ; eĉ ; idol. 12. ileks ; sport.

Vert. 1. titol ; flegi. 2. aren ; ke ; amel. 3. vi ; traleg ; ne. 4. ost ; alen ; pik. 5. unu ; kupe. 6. brik ; are. 7. ung ; kraĉ. 8. irid ; akn. 9. ver ; litr ; tip. 10. al ; milion ; do. 11. kuli ; ir ; ador. 12. uzurp ; spelt.

N-ro 90. strando ; fromaĝo ; komedio ; haringo (fa- ; la-) ; skarabo ; frakcio ; kanajlo ; afero (sf- ; of-) ; patrono (ma-) ; fjordo ; frosto ; korekta ; rekordo ; esplori ; strabi ; kastelo (pa-) ; eskorto ; estimi ; defendi ; inflamo ; admono ; rakonto ; aŭgusto ; aresti ; komisio. *Tro akra fajro estas sen daŭro.* (1149).

N-ro 91 : KRUCVORTENIGMO
Horizontale. 1. fosto (R) ; fiksi poŝtmarkon sur koverto (R). 3. skribi en tiucela libro notojn, pri kiuj oni volas konservi memoron. (R) ; maltrankviliĝi pro necerteco de io grava (R). 5. komercaĵo pri kiu oni ne pagis la doganon. (R). 6. numeralo ; fano. 7. loko (R) ; flokoj aŭ tavolo de kombita kotono (R). 8. sveni. 10. disigi (R) ; pere en akvo (R). 12. skriba sciigo (R) ; alkohola trinkaĵo (R).


Vertikale. 1. ĝi kaŝas kalvecon (R) ; starigi (R). 2. prepozicio. 3. li konigas al si la enhavon de libron aŭ gazeto (R) ; malkonfesante (R). 4. fari vestaĵon plektante fadenojn per specialaj vergetoj (R) ; 5. aŭdigi malfortan sonon de silkaĵo ; skeleto (R). 6. membro (R). 7. havanta iun difekton de la okuloj ; signo stampita sur vakso por certigi fermitecon de koverto (R). 8. kaŭzi malagrablan senton ĉe la dentoj (R). 9. herbeteĵo ; montri (R). 10. persona pronomo. 11. vasta, multampla (R) ; spekulado pri la prezoŝanĝo de borsaj valoroj. 12. rapide formovi ion de si tra la aero.

PROVERBENIGMO.

Ordigu jenajn letergrupojn, tiel ke ili nomu proverbon :

1. alĉ ; ank ; ius ; lon ; nde ; nka ; osia ; tul.
2. ana ; asv ; ego ; est ; kon ; man ; olal ; rta ; tra ; ŭfo.
3. avi ; epr ; gas ; lace ; lari ; lon ; med ; ojn.
4. ald ; amt ; emp ; eon ; epo ; iser ; njo ; rojs ; usi ; vas ; vin.
5. ang ; asti ; aŭdo ; esl ; idi ; kie ; nim ; non ; ono ; ras ; span.

La solvojn sendu Flandra Ligo al *Postbus 342 (Enigmoj), Brussel* ; kaj la nederlandanoj al *S-ro Teunissen, Burg. Tellegenstr., 21 hs, Amsterdam-Z.*, antaŭ la 20.9.50.



Unue mi petas vian atenton por la demando ĉu Esperanto estas lingvo logika. Vi eble mire, aŭ eĉ iom indigne, respondos ke tio tute ne estas problemo diskutinda, ĉar Zamenhof mem ja emfazas la logikan karakteron de sia lingvo, kaj ĉiuj esperantistoj ja samopinias kiel li, kaj cetere ni mem, kiuj sufiĉe regule uzas Esperanton, ja konstante spertas la mirindan logikecon de la zamenhofa lingvo. Tamen la afero estas malpli simpla ol ĝi ŝajnas kaj meritas ke ni iom esploru ĝin.

Logika estas tio kion oni per racia rezonado povas konkludi.

Ni ekzaminu ĉu la STRUKTURO de nia lingvo estas logika, alivorte ĉu el la ekstera formo oni povas dedukti la signifon de la Esperanto-vortoj. Ni prenu ekzemple la vorton « homo ». Analizante ĝin ni distingas du partojn, nome la radikon *hom* kaj la finaĵon *-o*. Ĉar tiu finaĵo karakterizas ĉiujn substantivojn ni povas logike konkludi ke *homo* estas substantivo, sed la logiko ne sufiĉas por klarigi al ni la sencan de la vorto *homo*, ĉar pri la signifo de la radikoj ni ne informas nin. Same ni povas logike konkludi ke *venu* estas imperativa formo, sed por fiksi la signifon, ni bezonas vortaron. La logiko eĉ ne sufiĉas por ebligi al ni fidiĉe analizi ĉiujn vortojn kaj determini ilian radikon. Nur helpe de la vortaro ni povas konkludi ke *venu* estas konjugacia formo de la radikoj *ven*, dum *unu* estas radikoj neanalizebla. En la vorto *dikulo* ni distingas la elementojn *dik* kaj *o* kaj ni povas diri ke *dikulo* estas dika ulo. Sed *speguloj*, *okuloj*, *formuloj* kaj *nuloj* tute ne estas uloj. Pri la radikoj de *knabino* kaj *edzino* ne povas ekzisti iu dubo, sed ni grave eraras se ni volas laŭ la sama procedo fiksi la radikojn de *maŝino*, *mandolino*, *margarino*, *kantino*, *Berlino*, *benzino* aŭ *zapelino*. Eĉ la vorto *konkubino*, kiu nekontesteble signifas inan estaĵon, ne toleras tian analizon ĉar vane vi serĉos en Plena Vortaro la vorton *konkubo*.

Se vi deziras planlingvon konstruitan sur pure logika bazo, tiam vi devas turni vin al unu el la multaj filozofiaj lingvoj, kiujn oni konstruis en la lastaj tri jarcentoj. En tiuj lingvoj la vortoj estas tute analizeblaj, kaj ĉiu vorto estas kvazaŭ formulo plene informanta vin pri la difino de la koncerna nocio. Ni rigardu ekzemple la vorton *Neka* el la planlingvo kiun antaŭ trident jaroj publikigis la angla scienculo *Dalgarno*. Ĉiu el la kvar literoj de tiu vorto havas propran signifon. La komenca litero indikas ke temas pri iu fizika konkretaĵo. La dua informas nin ke tiu konkretaĵo estas animalo, la tria ke ĝi estas mamulo, kaj la lasta indikas la specon : *Neka* signifas *elefanto*, kaj sufiĉas ŝanĝi la lastan literon por akiri la nomon de alia mamulobestoj : *Neké* estas ĉevalo, *Neke* estas azeno kaj *Neko* estas mulo. Jen brila kaj admirinda ekzemplo de pura logiko. Jen lingvo modela kaj perfekta, kies ununura maloportunaĵo estas ke ĝin povus lerni kaj manipuli nur perfektaj filozofoj.

Por ne eniĝi vin per troa detalado, ni iom turnu la kalejdoskopon kaj momenton haltu ĉe dua problemoj, kiu estas

ESPERANTO : LOGIKA LINGVO?

de dro W. Manders

parencas al la unua : se la strukturo de nia lingvo ne estas logika, ĉu almenaŭ ni povas diri ke por bone APLIKI LA STRUKTURAJN ELEMENTOJN la logiko estas necesa ? Aŭ alivorte : ĉu pravas tiuj gramatikistoj kiuj postulas ke ni zorge evitu ĉion kio estas kontraŭa al la logiko, eĉ se ĝi jam enradikiĝis kaj eĉ se Zamenhof mem iniciatis kaj sankciis tiun mallogikan tradicion. Ni prenu denove konkretajn ekzemplojn : ĉu en Esperanto estas tolerebla la esprimo *unu post la alia* ? Aŭ ĉu ni devas insisti pri la pli logika *post unu alia* ? Ĉu estas permesate pluraligi la adjektivojn en la frazo : *la plimulto de la ĉeestantoj estis kolektaj* ? La lasta ekzemplo montras ke la logiko ne estas kapabla solvi ĉiujn problemojn, ĉar se la logikemuloj argumentas ke gramatike la plimulto de la ĉeestantoj estas singulara kaj ke logike la adjektivo do devas kongrui kun *plimulto*, ni povas prave refuti tiun rezonadon per la logika konstato ke la adjektivo kvalifikas ne la kolektivon plimulton, sed multajn apartajn individuojn, kaj ke do estas konsekvenca uzi la pluralon. Ĉu ankaŭ koncerne la unuan ekzemplon ni povas diri ke *unu post la alia* estas logike ne malpli bona ol *post unu alia*, mi ĉi tie ne volas diskuti, ĉar ne la ekzemploj, sed la principa demando interesas nin.

Nu, la sola fakto ke la multaj pure logikaj lingvo-projektoj montriĝis senescepte mortnaskitaj infanoj, jam avertas nin ke ni ne tro alte taksu la valoron de la logiko por planlingvoj. Eble vi opinias ke tiuj lingvoj strukturo tro diferencis de Esperanto por formi taŭgan bazon de komparo, kaj tion mi ne kontestas. Sed tiu argumento certe ne validas por Ido, kies originala nomo *Esperanto reformita* same kiel la definitiva nomo *Ido* nemiskomprenible atestas pri la intima parenceco kun nia lingvo. Se vi konas tiun lingvon, vi scias ke ĝi estas tre simila al Esperanto kaj ke ĝin karakterizas ĝuste la emo al maksimuma logikeco. Ĝia ĉefa aŭtoro ne estis *De Beaufront*, kiel oni longe opiniis, sed *Couturat*, unu el la plej famaj profesiaj logikistoj de la lasta tempo. *Couturat* verkis tre interesan studon pri la vortfaraj principoj en Esperanto. Kun granda sagaco li montras en ĝi ke nia sistemo estas plena de mallogikaĵoj, kaj ĉar li opiniis la logikon la sola fidinda bazo por planlingvo, li zorge konstruis vortfaran sistemon treege logikan. Pri Ido ni ne povas pretendi ke ĝi mortnaskiĝis. Dum kelka tempo eĉ ŝajnis ke ĝi fariĝos dange- rala rivalo de Esperanto. Ni ankaŭ ne povas diri ke ĝi fiaskis ĉefe pro sia logika karaktero, sed fakto estas ke la idistoj post la unua entuziasmo pro la admirinda logikeco de sia lingvo baldaŭ komencis suspekti ke ili pagis tro altan prezon por tiu multe laŭdata kvalito. Dum la esperantisto senzorge uzas la esprimojn *ama konduto*, *ama letero*, *ama*

KOMUNIKOJ DE LA LIBRO-SERVOJ

La nova sezono komenciĝas ! Jen la tempo de kursoj, de studado, de legado.

Ni liveras por infankursoj :

Sub la verda Standardo : gvidilo	f. 2.50	—
Sub la verda standardo : laborilo I	f. 0.90	bfr. 12.50
Sub la verda standardo : laborilo II	f. 0.90	bfr. 12.50
Sub la verda standardo : memorigilo	f. 0.50	—
Methodisch leerboek	f. 1.25	bfr. 17.—
Beknopt leerboek Esperanto (Bennink)	f. 1.55	bfr. 22.—

por A-kursoj :

Leerboek Esperanto (Bennink)	f. 2.10	bfr. 30.—
Esperanta Krestomatiko	f. 1.50	bfr. 24.—
Zakwoordenboek	f. 0.50	—
Io pri historio, organizo por la A.-Kandidatoj	f. 0.25	bfr. 5.—

por B-kursoj :

Tra la Labirinto (5-a eld.)	f. 5.90	bfr. 78.—
Historio kaj Organizo	f. 1.25	—
100 Vragen over Grammatica	f. 0.35	bfr. 5.—
Voorzetsels	f. 1.50	bfr. 26.—
Plena Vortaro	f. 11.40	bfr. 175.—
Schidlof's Woordenboek	f. 2.25	bfr. 32.—

SENPAGE VI RICEVAS KONSILOJN !

Porti voor koper. Bestellingen aan :
Boekendienst LEEN, Z.O. Singel 5, Bergen-op-Zoom (giro : 76915)
Vlaams Esperanto-Instituut, Blankenbergsesteenweg, 72, Brugge.

JEUGDHERBERGGIDS 1950, uitgegeven door de Vlaamse Jeugdherbergcentrale, Oudaen 32, Antwerpen. Het zeer keurig en handig werkje (112 blz.) verstrekt uitleg over organisatie en doel van de VJHC, zegt wat een Jeugdherberg is, licht in over het bestuur VJHC, staat de trekker bij, bepaalt de aansluitingsvoorwaarden en de kosten. Het bevat tevens het alg. JH-reglement en de bijzondere reglementen voor klassen, groepen en verenigingen. Benevens de eenheidsprijs treft men er ook de lijst der Jeugdherbergen in België, met de

speciale inlichtingen voor ieder van haar. Er wordt ook buiten de grenzen getreden, want er is een lijst voorhanden over de JH in Nederland, Wallonië en Groot Hertogdom Luxemburg. De belangstellende vindt er ook een schets over de historie van het JH-werk en allerlei inlichtingen in verband met het trekken. Bijgevoegd werd tevens een kaart met de bestaande J.H. voor het Benelux-gebied. Voorwaar een interessante gids die de ogen van de leek doet opengaan en voor de trekker onschatbaar nuttig is !
T.V.G.

ĉiujn problemojn. Feliĉe la solvo ordinarare tute ne urĝas, ĉar plej multajn problemojn kreis ne la sperto kaj praktiko, sed ĝuste la logiko kaj ĝiaj adeptoj. Oni kritikas formojn ne ĉar ili montriĝas erarigaj kaj malfacile kompreneblaj, sed sole ĉar oni opinias ilin kontraŭaj al la supozita logika karaktero de nia lingvo, kaj kion oni opinias logika, tio ofte estas rekta sekvo de la nacilingva esprimmaniero. La *-ata*, *-ita* problemoj estas logike nesolvebla, ĉar kie la franco logike pledas por *-ita*, tiu sama *-ita* formo ŝajnas al la nederlandano logike netole- rebela.

Resume ŝajnas al mi ke ni agus prudente se vi evitus uzi la terminon *logika*. Pli bone taŭgas la adjektivo *racia*, sed ankaŭ la racio tute ne estu la ĉefa bazo de nia lingva apliko. La analogio kaj la rutino ludas ĉefan rolon en ĉiu nacia lingvo, kaj en lingvo nepre regula kiel Esperanto ne la logiko sed ĝuste la analogio igas ĝian lernadon kaj uzadon simpla kaj facila.

(daŭrigota)

ANONCETOJ

Ĉiu vorto aŭ mallongigo : g. 0,05 aŭ bfr. 0,75. Minimume : g. 1.— aŭ bfr. 15.—

Tipografia lernanto, 17-jara deziras korespondi kun samaĝulo : H. Beverloo, Burg. Gaarlandtstr. 35, Gorinchem (Ned.)

Als overtuigd esperantist is U natuurlijk ook een goed propagandist maar bezit U reeds het nieuwste propagandageschrijfje, uitgegeven door N.C.K.E. ESPERANTO, DE WERELDHULPTAAL

Formaat als van de « sleuteltes » 16 blz. Prijs fl. 0,03. Verkrijgbaar bij de boekendienst.

Ĉeĥoslovaka teknika oficisto, 20-jara, deziras korespondi ; speciale interesiĝas pri p.m., bildkartoj, gazetoj ktp. Adreso : Andrej Macura, Ostrava III, Sevcikova 6.

De V.A.B.-wegenkaart voor 1950 is verschenen (100 x 65 cm.) ; uitgevoerd in tweekleurendruk, geeft zij de toestand weer van al de wegen voor motorvoertuigen, die de gemeenten van België, het Groot Hertogdom en deze der grensge- westen in Nederland, Duitsland en Frankrijk verbinden. De hoofdwegen werden van de andere onderscheiden en de afstanden tussen de gemeenten en belangrijke kruispunten werden gekwo- teerd. Ten slotte verhoogt een uitge- breide afstandstabel het nut van deze V.A.B.-uitgave, die slechts 5 frank kost. Bestellingen worden uitgevoerd na ont- vangst van het bedrag op P.R. 324.558 van de Vlaamse Automobilistenbond, St. Jacobsmarkt, 45 Antwerpen.

Verantw. uitgever : Vlaamse Esperan- tisten-Bond Postbus 342 — Brussel en Ned. Esperantisten-Vereeniging LEEN, Stadionkade 6 Amsterdam Z. (Ned.) — Drukkerij : J. Van Laer, Korte Begij- nenstraat 38, Turnhout.